

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.
Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komerco“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Protaktantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W.M. Page, advokato, Edinburĝo
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gill Noria, komercisto, Barcelono

H. Fischer, grandindustriisto, București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabrikkonduktoro, Kaunas.

N-o 204
10. 8. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. K8ln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,06 dolaro aŭ 0,50 sv. fr. por landoj, kies valuto suferis maksimume 80%; por ĉiuj aliaj landoj 0,08 dol. aŭ 0,55 sv. fr.

Anonprezo

po kvadrata-centimetro egalvaloro de 0,20 sv. fr. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fr.), en „Internacia Komerco“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburĝo, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

1914—1924.

La 1 (19 julio) de aŭgusto 1924.

Hodiaŭ, la 1-a aŭgusto festas tutmonda homaro deklaran jubileon de komenco de la granda mondmilito. Antaŭ dek jaroj tonдриĝis unuaj pafitegoj, anoncanta sian teruregan detrueman laboron kaj malamon de popolo.

El malgranda semeto sur Balkano disvastiĝis la batalo en tutmondon, postulante vivojn de milionoj da homoj kaj okazigante grandan malprofiton al tutmonda ekonomio kaj kulturo. Nun ĝi estas jam finita, sed ne estas ankoraŭ pasintaj ĝiaj postsignoj — oni devas multe klopodi por reboniĝi la vivon kaj plisuprenigi popolan kulturon kaj perdisigi la malamon, parte ĝis nun konservantan inter la popoloj.

Tutmonda homaro! Festu hodiaŭan tagon kiel feston de la paco, por ke forgesu la militon kaj ĝiajn teruraĵojn. La paco atingita per la flamiĝema batalo, ree regas nun, post dek jaroj — estu ĝi saluta, daŭru ĝi longe kaj restu por ĉiam.

Vivu inter la popoloj amo kaj vero, regu paco kaj justeco eterne sur tero — beno kaj felico de la homaro.

H. A., Estonio.

Socia Vivo.

Sciigoj pri laboro por la tuta mondo.

La Internacia Labora Oficejo faras tre grandajn servojn per la dono de informoj pri laboraj kaj industriaj demandoj responde al petoj.

En la jaro 1923 la Oficejo sendis detalajn respondojn al 323 petoj pri informoj. Multaj el tiuj necesigis enketojn pri pli ol unu demando. Tiu nombro konsistigas rekordon en la historio de la Organizaĵo.

La petoj venas de Registaroj, mastraj asocioj, laboristaj sindikatoj, universitatoj, bibliotekoj, filantropoj kaj aliaj institucioj, en la jenaj landoj: Aŭstralio, Aŭstrio, Belĝio, Ĉeĥoslovakio, Finnio, Estonio, Francujo, Germanujo, Granda Britlando, Hindujo, Hispanujo, Hungarujo, Italujo, Japanujo, Jugoslavio, Kanado, Latina Ameriko, Latvio, Litovio, Nova Zelando, Nederlando, Norvegujo, Polujo, Rumanujo, Svedujo, Svislando kaj Usono.

La plej grandaj nombroj da petoj venis el Granda Britlando (80), Svislando (57), Belĝio (54), Francujo (53), Germanujo (20), Italujo (20) kaj Ĉeĥoslovakio (16).

La temoj pri kiuj oni petis informojn ampleksas: laborkondiĉojn (inkluzive horoj kaj salarioj, teknika instruado, lernoservo, profesia orientigo, socian asekuron, (inkluzive senlaboreca asekuro) industriajn higienon kaj sendanĝeron, laboristan kontrolon kaj elmigradon.

La informoj donitaj al Registaroj havas specialan gravecon, ĉar ili ofte estas petitaj por la preparo de novaj naciaj leĝoj aŭ administrativaj regularoj. Informoservo de la Internacia Labora Oficejo.

Pliiĝo en Itala Elmigrado.

La finaj statistikoj por 1923 eldonitaj de la Itala Generala Departamento de Elmigrado montras grandan pliigojn je la nombro da elmigrantoj, kaj transmaraj kaj kontinentaj. La lasta klaso ampleksas elmigrantojn al aliaj Eŭropaj kaj Mediteraneaj landoj. Kontraŭo estas malgranda ŝanĝo je la kvanto da repatriiĝoj, ĉar la pliigo je la nombro da kontinentaj repatriiĝoj estas preskaŭ ekvilibrita per la malpliigo je la nombro da transmaraj repatriiĝoj.

La tuta nombro da elmigrantoj el Italujo en 1923 estis 548 079, pliigo de pli ol 100 000 sur la cifero por 1922.

Francujo daŭre estas la lando, kien sin turnas la plej granda nombro da italiaj kontinentaj elmigrantoj. 142 990 enmigris tien en 1923 kontraŭ 85 815 en 1922. La itala enmigrado en la plej multajn el la aliaj eŭropaj landoj malmulte pliigis.

Pluaj sciigoj pri itala elmigrado troviĝas en Socialaj Informoj, la ĉiusemajna eldonaĵo de la Internacia Labora Oficejo.

Informoservo de la Internacia Labora Oficejo.

Aparatoj por la invalidoj.

La Internacia Labora Oficejo antaŭ ne longe eldonis ilustritan volumon de ĉirkaŭ 500 paĝoj, kun la titolo „Artefaritaj membroj: Aparatoj por la Invalidoj“, kiu devas esti utila por militinvalidoj, viktimoj de laboraj kaj aliaj akcidentoj, insulfuio de asekuro kontraŭ akcidentoj kaj invalideco, kaj ĉiuj tiuj, kiuj interesiĝas pri la anstataŭigo per artefaritaj aparatoj de membroj perditaj per amputo.

La preparo de tiu verko rezultis el deziro, esprima de la internacia konferenco de reprezentantoj de militinvalidoj, kunveninta en Genève en 1921, ke oni kolektu kaj disdonu ĉiujn haveblajn informojn pri la plej bonaj tipoj de artefaritaj membroj kaj ortopediiloj, kaj speciale tiuj intencitaj por ebligi la kriplulojn gajni sian vivadon per industria aŭ alia laboro. Oni forte deziris ke la progreso farita en tiu ĉi kampo fariĝu utiligebla kiel eble plej larĝe.

Kun tiu celo la Internacia Labora Oficejo komisiis al D-o Florent Martin, Direktoro de la Teknika kaj Scienca Instituto pri la meto de artefaritaj membroj en Bruxelles, la auditan taskon, kaj la nuna volumo portas lian nomon. La verkisto rimarkigas ke la artefaritaj membroj estas grava rimedo por redoni al la invalidoj la taŭgecon por gajni salajron. Li pensis, ke estas eble per efika ortopedio, grandmezure restarigi la laborpovon kaj kiel ofte eĉ ebligi la invalidon praktiki metion tiel bone kiel ne-kripligita laboranto.

La volumo priskribas la diversajn aparatojn uzatajn en diversaj landoj kun ilustraĵoj kaj kritikoj. Informoservo de la Internacia Labora Oficejo.

La mondorganizaĵo de la transportistoj propagandas Esperanton.

La sekretario de la „Internacia Transportista Federacio“, sidejo Amsterdam, organizaĵo kun 2035958 membroj unuigitaj en 55 asocioj kaj 26 landoj sendis jenan leteron al la redakcio de la fervejoj sindikato germana:

Internationale Transportarbeiter-Föderation.

Amsterdam, la 28 julio 1924.

Al la

Redakcio „Deutscher Eisenbahner“

Berlin W. 50
Rankestr. 4.

Kara kamarado!

Mi legis en via ĉiam interesplena gazeto „Deutscher Eisenbahner“ (germana fervejisto) (27 julio) viajn rimarkojn pri Esperanto.

Kvankam mi ne estas ankoraŭ esperantisto en vera signifo de la vorto — mi nur lernis la helplingvon por esti kapabla legi la esperantlingvajn gazetojn kaj eventualajn ricevitajn leterojn — la sperto de nia internacia laboro min konvinkigas pli kaj pli je la praktiko utileco de la helplingvo por la plenumiga de nia tasko.

Eble vi rimarkis la klopodojn de la holandaj fervejistoj antaŭ kelke da tempo por interesigi la alilandajn transportistojn je la I. T. F. per esperantilaboro. Bedaŭrinde tiuj kamaradoj ne sukcesis.

Mi do ĝojas treege je viaj rimarkoj kaj mi esperas, ke viaj vortoj alportos bonan rezulton en via lando.

Kun koraj internaciaj salutoj!

Für die

Internationale Transportarbeiter Föderation:
gez.: Nathans, Sekreter.

La letero de la kamarado Nathans estas kuraĝa faro kontraŭ la skeptikulojn en la laborista movado. Ĝi ne restos sen sekvoj. G. Pietsch.

Scienco.

Etnologio.

Indianoj en okcidenta Venezuelo.

Laŭlonge la landlimo inter Kolombio kaj Venezuelo, en valoj de la riveroj enflantaj en la sudokcidentan parton de Lago Maracaibo, vivas gentoj indianaj kiuj neniel aŭ nur tre malmulte havis kontakton kun „hispanoj“ (nomo donita de indianoj al ĉiuj blankuloj). Ili rigardas kun sentoj pli malpli malamikaj ĉiujn fremdulojn. La indianaj loĝantaj sude prefere ekzercas rabadon kaj de tempo al tempo invadas la tendarojn de entreprenoj petrolesplorantaj. Unu el tiuj kompanjoj, vane peninte insiĝi genton najbaran je paca sintenado, fine devis defendi sin per armiloj. Iufoje la tendaro de entrepreno angla estis atakata de bando konsistanta el 400 armitaj indianoj.

La indiĝenoj estas ĉiuj armitaj kun pafarko kaj sagoj, sed en kun fajroarmiloj. Uzado de sagoj venenitaj ne estas kutima. Sur duoninsulo Goajira (elpar. Gvahir) vivas gento multe pli inteligenta al tiuj loĝantaj sude. Ĝiaj anoj havas pafarkon kaj sagojn venenitajn per la batalo, la kazikoj kaj anoj riĉaj eĉ portas pafilon „Winchester“ grandkalibran. La anoj de tiu gento sin dediĉas al bredado de ĉevaloj, muloj, ŝafoj kaj kaproj; ili submetiĝas je nenia leĝo escepte je tiu de siaj estroj. Pro neceseco trovi akvon kaj paŝton por la bestaro kiam la ĉiujaraj ventegoj sekigas paŝtejojn kaj cisternojn, ili gvidas vivon nomadan.

Geologiistoj vizitantaj iufoje zonon de indianoj vekis viglan intereson inter ili. Maljuna kaziko esprimis la deziron sciigi ĉu ĉiuj fremduloj manĝas „potojn“ (ujoj por konservajoj) kaj vestas sin per rajdpantalonoj kaj ledaj gamaŝoj, dirante ke vestaĵo de kaziko ne estas tiom komplikita.

K. G. Frietsching, New Orleans (Usono).

Kemio.

Oro el hidrargo!

Per vekiĝo de la Scienca Kemio la revoj de la mezepokaj alkemiistoj fariĝis himeroj. Antaŭ dek jaroj neniu sciencisto pridubis la nefendebledon de kemio atomo. Oni konis radioaktivajn elementojn, kies atomoj troviĝas en stato de konstanta disfalo, sed tiu disfalo ne povas esti akcelata aŭ malakcelata per iaj ĝis nun konataj rimedoj. En junio 1919 Sir Ernest Rutherford sukcesis fendi la atomon kernon de nitroĝeno pere de a-radioj. Per tio estas principo pruvata la ebleco fendi laŭvole komplikitajn atomojn en pli simplajn aŭ alivorte, ricevi el pli peza kemio elemento pli malpezan. Komence de aprilo en tiu ĉi jaro la estro de la fotokemia laboratorio de la teknika alternejo en Berlin Prof. A. Miethe sukcesis fendi la hidrargan atomon kaj ricevis oron en analize konstatebla, eĉ pesebla kvanto. Ni citas Prof. Miethe:

„Depost jaroj mi okupas min pri kolorigo de diafanaj mineraloj sub eliko de ultraviolaj radioj. Ĉe tio estis uzataj ordinaraj hidrargolampoj. En junio 1923 mi ricevis novekonstruitan lampon, kiu liveris pli helan, kontinuan fundon de la spektro kaj kiu gro tio estis tre bonveninta. Analizante pli detale la efekton de la lampo mi trovis, ke la lampo ĉe troa ŝarĝo rapide „eĝas“ kaj ke ĝi interne ricevas nigran kovraĵon. Analizante ĉirkaŭ 0,5 gramojn de la restaĵoj, post distilo de la hidrargo, mi trovis en la amalgameca maso interalie oron.

Antaŭ dek jaroj tiu trovo apenaŭ estus alitrinta al si atenton. Tiam oni devus esti konkludinta, ke la hidrargo, kvankam dufoje distilita, entenus tiun maloftan metalon. Hodiaŭ ni ne povas ne atenti tiun trovon. Oni ja rajtas skribi jenajn formalajn identaĵojn:

Hg (201) — He (4) = Au (197)

Hg (201) — 4H (1) = Au (197)

Ĉiokaze ĝi ne ŝajnis malebla, ke hidrargo, kies atoma pezo estas tiel proksima al tiuj de la radio-

aktivaj elementoj, povus disfali dum ĝis nun ne konataj kondiĉoj.

Pri tio sole nova eksperimento povis decidi. Ĉe la uzataj lampoj la anodo komunikis kun la atmosfero. La tensio ĉe la elektrodoj estis ĉirkaŭ 170 voltaj. La lampo konsumis 400 ĝis 2000 Watt-ojn.

La uzata hidrargo laŭ analizo de K. A. Hofmann ne entenis oron. Ĉe la ekstreme akraj metodoj de Haber ne povis kun certeco konstati la ĉeeston de oro. Komprenibile estis konstata ke la elektrodoj ne enhavis oron. Post fino de la eksperimento la hidrargo estis orhava.

La konstato de oro estis jenmaniere certigata. La metalo, kiu restis post solvado de la lasta hidrargo en nitrata acido, estis ore-flava, konsistis el aglomeraĵo de bone formitaj, kubaj kaj oktaedraj kristaloj. La metalo estis fleksebla; post dubla refleksio de la lumo sur ĝia polurita surfaco montriĝis la konataj restadiĵoj de pura oro.

Kontrolo de atomezo kiel ankaŭ konstato de helumo resp. hidrogeno en la forno ne estis efektiveblaj. Komprenibile ili estas de plej granda teoria graveco.

Laŭ kalkulo por fabrikado de 1 kg da oro laŭ la Miehle-a metodo oni bezonus hidrargon kaj elektron en valoro da 20 milionoj da markoj. La disfalo de la hidrarga atomo do — almenaŭ hodiaŭ — ne havas ekonomian signifon.

Estas konate, ke antaŭ pli ol dek jaroj la ingeniero H. Lohmann sukcesis konstrui elektran fornon, per kiu oni atingas temperaturojn de pli ol 4000 da gradoj. La konstruisto estas konvinkita, ke oni per tiu forno povos ekonomie utiligi la Miehle-an eltrovon.

Resume oni povas diri, ke la ekonomia ellaboro de la eltrovo absolute ne estas malebla. Eble la Lohmann-a forno solvas la problemon.

E. Lindquist, Berlino.

Medicino.

Internacia Konferenco por batalo kontraŭ malario.

En Moskva 15. julio estis malfermata internacia konferenco por batalo kontraŭ malario, al kiu alvenis la malariala komisiono de Ligo de Nacioj, konsistanta el reprezentantoj de sciencaj organizaĵoj el 11 eŭropaj landoj.

Pri disvastigo de malario en U.S.S.R. (Unuiĝo de Sovietoj, Socialistaj Respublikoj) raportis D-o Dobreĉer, ĉefo de epidemia fakto: la nombro de malsaniĝoj je malario plimalgrandiĝis en plimulto de laŭvolgaj, nordaj kaj centraj gubernioj. Precipe en Moskva gubernio montriĝis bonaj rezultoj de pasintjara batalo kontraŭ malario: malsaniĝoj de dekfoje malplimultiĝis. Sed aliflanke la epidemio rimarkinde plifortiĝis en Ukrainio, sur Uralo kaj en Siberio.

Laŭ „Krasnajn Tatarija“ Kazanj H. Frank.

Vakcino kontraŭ la tuberkulozo.

Laŭ sciigo de Prof. Calmette al la Scienca Akademio de Paris, li post multaj longaj eksperimentoj sukcesis eltrovi vakcinon, kiu imunas la infekton de la tuberkulozo. Li praktikis tiun vakcinon sukcesplene je multaj eksperimentbestoj, kiel ankaŭ je 249 suĉinfanoj, kiuj vivas en malbonaj higienaj cirkonstancoj

Gustav Höhn, Zürich.

Botaniko.

Disvastiĝo de kreskaĵoj.

La insulo Krakataŭ en la Sunda marstrato montras grandegan, nuntempe videblan ekzemplon pri la disvastiĝo de kreskaĵoj kaj la ĉi-rilatataj problemoj.

1883 grandegaj vulkanaj eksplodoj detruis parton de la insulo kaj ruinigis la tutan organisman vivon, ĉiujn vegetaĵojn kaj bestojn. La tuta tero estis kovrata per alta tavolo de pumiko. Ne restis plu ĝermo de vivo sur la tuta insulo. La plej proksimaj insuloj estas Java kaj Sumatro en distanco de 35 kaj 45 km. Post 40 jaroj la tuta insulo estas dense kovrita de multispecaj kreskaĵoj. Nur per helpo de la praarbara tranĉilo oni devas trapaŝi la densegajn arbarojn.

La scienculo Treub studis la novkreskitajn vegetaĵojn kaj trovis valorajn rezultojn laŭ natur-sciencia vidpunkto. 1886 Treub nur trovis bakteriojn diatomajn kaj cianoficeojn. Ĉi tiu verda gelatena kovraĵo fariĝis la fundamento por la sporoj de muskoj kaj filikoj, por la semoj de flor-vegetaĵoj. La plej granda parto de kreskaĵoj estas alportita per la vento, kelkaj per la maro. La juna vegetaĵaro enhavis 11 specojn da hindomalaj filikoj laŭ la esploro de Treub 1897.

1906 oni jam rimarkis la formiĝon de kuniĝo de vegetaĵoj de samaj vivkondiĉoj. Oni jam povis diferencigi la formojn de sabla regiono, la florojn de duonoj, la zonojn de bordaj arbaroj = formiĝo de Barringtonia.

La verkisto de tiu ĉi artikolo petas la samdeonajn legitojn la artikolon kaj konante la insulon laŭ propra vido, daŭrigi kaj kompletigi la artikolojn. Estas tre interese, ricevi sciigojn pri la disvastiĝo de bestaro, precipe de moluskoj, vermoj, iasĉktoj ktp. La aziaj, precipe la malajaj samideanoj povas fari servon al la scienco, sciigante la eŭropanojn pri tiaj demandoj. Samtempe ili helpas disvastiĝi la uzon de nia lingvo en sciencaj rondoj.

Albert Läuffer, Priesterseminar, Mainz, Germanujo.

Arkeologio.

Eltrovo de la turo de Babelo.

El „Das Goldene Zeitalter“, Bern, Svislando. Anglaj ĵurnaloj komunikas la plej novan scion de la prahistoria tempo: la malnova turo Babelo estas eltrovita; ĉe la elfosadoj, kiujn aranĝis la ekspedicio kun la Universitato de Pensilvanio je la tereno de la urbo de la haldeoj, Ur, la plej malfacila laboro estis, malkovri la grandan terasoturon.

Antaŭ ol tiu ĉi laboro komenciĝis, tiu ĉi turo, kies gigantaj mezuraĵoj konkludigas, ke fakte agiĝis la turkonstruo de Babelo, estis nur de truajaro kun krute kondukantaj abismoj, nerekonfeblaj, kion ĝi prezentas. Nun potenca tegola konstruaĵo leviĝas al la ĉielo, kies grandeco kaj distingiĝanta konserviteco faras ĝin je la plejbone konservita monumento de la antikveco en Mesopotamio.

Sur aree leviganta teraso, altegiĝanta super la ebenaĵo, en kiu kuŝas la urbo, staras kvarangula konstruaĵo de 195 metroj da longeco, 150 metroj da larĝeco kaj 60 metroj da alteco. La tuta konstruaĵo estas farita el masonaĵo, kunmetita el gigantaj granitaj kuboĵoj, kiuj ŝajnas esti destinitaj por la eterneco. La maso de la plisuba teraso kun ĝia triobla ŝtupara irejo estis konstruata de la reĝo Aengur, kiu regadis ĉirkaŭ la 2550-a jaro a. Kr. La grandioza instalaĵo de la turo, tiel kiel la potenco digneco de la formoj bone reputaciata regiono, kiu al si memis tie ĉi senmortecan monumenton. La supera parto de la konstruaĵo, tiom kiom ĝi estas konservita, devenas el la tempo de la lasta reĝo de Babilono, Nabonidos, kiu provis konstrui 555 a. Kr. la tiam jam disfalemiĝintan konstruaĵon. La tegoloj montras stampilojn kun lia nomo, kaj inter la ruinaĵoj oni estas trovintaj argilajn cilindrojn kaj surskribaĵojn, sur kiuj estas rakontitaj la historio de la konstruaĵo kaj la pia laborado de la restarigo.

Observante la monstraĵon mezurojn de tiu ĉi 4000 jarojn aĝa monumento kaj pripensante la laboron, kiun postulis la surkonstruado de tiuj ĉi ŝtonamasoj, ĉiu racia esploranto devas ree komentari tiun ĉi antikvan neroman ŝtonan atestanton kiel neĝo de la evolucia teorio.

Ĝi krome konfirmas la laŭbibliajn konstatojn, ke la lulilo de la homaro troviĝas en Mesopotamio kaj ke tiuj antikvuloj ne estis senkulturaĵo kavernuloj, sed malgraŭ la pekfalto, ankoraŭ alte talentitaj estaĵoj.

Ankoraŭ antaŭ nelonge la scienco mokis pri la biblia fabelo de la turkonstruado de Babelo; hodiaŭ ĝi estas ĉe la fakto kaj ĝi devas, kiel en miloj da aliaj kazoj, ankaŭ en tiu ĉi afero mudiĝi.

A. Egg, Baden.

Matematiko.

„La Relativeco en la kritiko“

estas la titolo de la portugala aŭtoro A. Diniz. Li faras interesezan eksperimenton aplikante la leĝojn de la Generala kaj Speciala Relativeca Teorio por la beletristika kritiko. En Rio de Janeiro aperis tiu ĉi literatura relativeco. Inter alie la aŭtoro sugestas ke „tempo kostas monon“ („time is money“), do la homaro devas ĝin plej saĝe profitizi ankaŭ sur la literatura kampo. Sekve la plej bona libro devas kaŭzi maksimuman efikon dum minimala tempo. Aŭ rilate al la spaco, iuj verkoj estas plej valora, se ĝi donas la plej gravan sur malplej granda spaco.

Tiu ĉi apliko de la Einstein'a Teorio por la estetiko signifas tion, ke la mallonga teatraĵo, poemeto aŭ novelo estas la plej valoraj kreaĵoj de la moderna literaturo.

Sed ĉu la verkoj de Shakespeare, Balzac kaj Victor Hugo ne plu estas „modernaj“? Kelkiuj eble opinias la malon.

Josefo Major, Oldenburg.

Mineralogio.

Por plibonigi ŝtonkarbon.

Prof. Kuznecov en Leningrad trovis novan metodon mekanike plibonigi ŝtonkarbon. Nun anstataŭ koalko oni povas uzi sukcese malbonkvalitan karbon, kies kvalito povas esti egala al la plej bona kardiŝarbo, se aniaŭe apliki la metodon. Ĝi ebligas uzi en vasta industrio ĉiun rusan karbon. Esenco de la eltrovo konsistas en tio, ke oni dispecigas karbon kaj forigas almiksajn per simpla rimedo. La rimedo eliminis mankon de polva kaj briketa hejtaj. Almiksante malgrandan kvanton da minerala oleo, kaj varmigan ĝis 450 gradoj, oni ricevas en rezulto kompaktan, bonkvalitan ŝtonkarbon.

P. Pavel, Kiev.

Tekniko.

La dua plej granda preĝejo de la mondo.

Je la 19. de ĉi tiu monato (Julio) en Liverpool en ĉeesto de la reĝa paro kaj de ĉiuj episkopoj de la anglkana eklezio la finita parto de la katedralo, kiu depost dudek jaroj estas konstruata, estos solene konsekrate. Ĉi tio estas la unua

vera konsekrado de preĝejo depost la jaro 1225, ĉar la dum 700 jaroj en Liverpool konstruitaj preĝejoj estis starigitaj anstataŭ aliaj preĝejoj kaj staris tial sur jam konsekrita fundo. Kiam la konstruaĵo estos finita, Anglujo povos sin glori, posedi la duan plej grandan preĝejon de la mondo, kiu rilate al la dimensioj, egalarange marŝas je la flanko de la Petrokatedralo de Roma. Krom la grandeco de la nova Liverpool-a katedralo precipe ankaŭ atentigas la persono de la konsiruesro tial, ĉar la planoj de la preĝejo prezentas la laboron de dudekjara konstruistvolviĝo, kiu, kio krome estu notite, ne apartenas al la anglkana eklezio, sed estas katoliko. Li nomiĝas Giles Gilbert Scott, estas lernanto de la reĝa konstruistlernejo en London kaj laboras kiel lernanto ĉe Liverpool-a arkitektura firmao. Kiam la konkursa propono por ricevo de planoj por la katedralo estis proklamata, decidis la ĉefo de la firmao partopreni je la konkurso, kaj la saman faris tie sia juna dungito, sen scieto de la ĉefo pri tio. Scott estis devigata, ellabori la planojn por la giganta konstruaĵo dum la apenaŭ sufiĉaj libertempaj horoj, kiujn lasis al li la laborado en la skribaĵo kaj II ofte matene, kiam li aperis tro malfrue kaj ne satisfarante je la laborloko, devis enpoŝigi severan riproĉon de sia ĉefo, kiu la laciĝon de sia helpanto atribuis nur al lia vagema vivo. Kiam la konkursoĵantoj la projekton de Scott dekoris per la unua premio, la felicita preminto ne estis tiom mirigita ol sia ĉefo. La nova katedralo trovis ĝian lokon. La Liverpool-a katedralo estos pli longa je ĉirkaŭ 55 m ol la Londona St. Paulokatedralo kaj je 40 m pli longa ol la Westminster-Abatejo. Ĉi tiu povus oportune trovi lokon en la Liverpoola gigantaĵo kaj ankoraŭ lasus lokon por dua samgranda konstruaĵo.

El „Neues Wiener Journal“, H. FahnI, Wien XIII, Teybergasse 13.

La plej granda konstruaĵo

de la mondo estas la Parlamento en London. Ĝi enhavas 1100 ĉambregojn, okupas la areon de ĉ. 40000 kvadratmetroj. La longeco de la koridoroj estas du mejloj kun 100 ŝtuparoj. Ĝi estis konstruata de Charles Barry kaj konstruita en 1840-52. J. Major, Oldenburg.

Pri salfabrikado en Hindujo.

Sur la insulo Madura (kontraŭ Soerabaja, Java) kuŝas salfabrikejo. Ĝi estas nomita Kaliangit kaj ĝi estas la sola en tuta Hindujo entrepreno de la ŝtato Nederlanda, por ke la plej necesa mastrumobjekto ne estu vendata pere de marĉandistoj je tro alta prezo. Kvankam ĝi kostas nur po 6 uncoj 10 cendojn. (6 uncoj nomita Kattie estas la ordinare india pesilo kiel Kg. en Eŭropaj landoj.

Tiamaniere do la ŝtato rikoltas grandan profiton de ĝi samtempe. Tamen sen tia kontrolo, ĝi estus pli multe kosta. Nun la ŝtato mem fiksas la prezon.

En tiu fabrikejo laboras pli ol 200 Eŭropanoj kaj pli ol 3000 da Indigenoj inter kiuj troviĝas multe da virinoj. La viroj kiuj laboras tie en la fabrikejo portas maskojn pro danĝero. Ankaŭ ili portas veŝtaĵon tute fermitan de la kolo ĝis la piedoj.

La virinoj nur portas tuketon, por kovri tion, kion oni kutime volonte vidas. Sed tiuj laboras ankaŭ ekster la fabrikejo.

La salo estas fabrikita je simpla maniero, ekz. sur ebenaĵo al la maro oni kaptas akvon kaj pere de kluzoj oni tenas la restajn inter la kluzoj. La restaĵo ŝajnas esti koto kaj post lavado ĝi estas preparata kaj kunpremita en pecoj de 6 uncoj.

Ne estas permesate eniri la fabrikejojn pro danĝero.

En ĉiuj lokoj havante minimume 2000 da enloĝantoj ĝi estas aĉetebila. La ŝtato salvandado estas komparebla je Opio. J. T. Kaptein, Batavia.

Sporto.

Ĉirkaŭ tero per bicikloj.

Tri moskvanoj Pleŝ, Knjazev kaj Fejdberg ĵus finintaj Centran Registaran Instituton de Fizika Kulturo, 1 julio komencis en Moskvo vojaĝon ĉirkaŭ tero per bicikloj.

La 13 ili alvenis en Kazanj. Celo de ilia vojaĝo: propagandi la ideon de fizika kulturo, klarigi la influon de tia vojaĝo sur homan organizadon, esplori la taŭgecon de sovjetaj bicikloj kaj pneŭmatiko. La daŭron de ilia vojaĝo ili kalkulas dujaran.

Laŭ „Krasnaia Tatarija“ Kazanj. A. Frank.

Aer-glitveturila konkurso

Moskvo-Nijni-Novgorod-Moskvo.

Por esplori la praktikan uzeblecon de glitveturiloj movigataj per aerhelico (t. n. aeroglitveturiloj) sur rusaj soseoj, de 7 ĝis 13 marto unujara estis arangita vejkuro de Moskvo al Nijni-Novgorod kaj reen. La konkurso partoprenis 11 maŝinoj, konstruitaj de teknikistoj de Moskva Scienca Aŭtomotora Instituto kaj Centra Aero-

hidrodinamika Instituto, kun motoroj de 35 ĝis 125 C.P. La tutan distancon de 800 km traveturis 4 aparatoj, kun meza rapideco de 20 km hore.

Tio estis la unua fliuspeca vetkuro en la tuta mondo.

Lai rusingva sportjurnalo "Krasnij sport" (Ruĝa sporto) H. F., Kazan.

Diversaĵoj.

La 13 viroj, farintaj plej gravajn servojn al homa kulturo.

La profesoroj de la Universitato en Washington elektis komitaton, kies celo estas starigi liston de 13 viroj, farintaj plej gravajn servojn al kulturo spirita en la mondo.

Pri la plej granda muro de la mondo.

La fama "hina muro" nuntempe estas mal-konstruata; ĝiaj brikoj kaj ŝtonoj estas bezonataj por aliaj konstruaĵoj. Sed daŭros certe ankoraŭ longan tempon, ĝis kiam tiu ĉi giganta konstruaĵo, estante la plej longa muro ĝis nun konstruita, tute estos malaperinta.

Antikvaj kronikoj raportas, ke la hina imperiestro Huang Ti konstruigis la muron ĉ. 200 a. K. Estis okupitaj 300000 soldatoj kaj ĉiuj enkarcerigitaj krimuloj de tuta Ĥinujo.

Joh. Bernhard, München.

Radio.

Represo en nacilingvaj radio-gazetoj nepre rekomendata!

Königsberg.

La 9 julio s-o D-o Nitz, Königsberg faris duonhoran paroladon pri Esperanto de la stacio de Königsberg. La parolado estis bone aŭdata je diversaj lokoj.

Ni repetas ĉi tie nian peton. Ĝustatempe informi nin pri tiaj aranĝoj gravaj por nia propagando. Tre laŭcele estos ankaŭ klare informi nin pri la koncerna temo de l' parolado.

Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktualaj, fidindaj kaj kompletaj informoj, ni bezonas sceligojn (sen postkarto aŭ aparte folietoj unuflanke skribitaj, sed ne inter admistrataj aŭ privataj sceligoj) pri ĉiu novato el la esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj).

Ĝenerala.

Ĝenerala.

London. Subĉielaj propagandaj kunvenoj okazas regule en Hyde Park, Tinsbury Park kaj Clapham Common. La 22 VII s-o Aug. Pillik, prezidento de la Ĉeĥoslovaka Esperanta Instituto, parolis en Hyde Park en Esp. kun interpretado, kaj respondis Esperante al demando: pri laboristaj kaj industriaj cirkonstancoj en Ĉsl. Respubliko.

Oficialaj Esp.-kursoj okazos en sep vesperaj institutoj dum komencota sezono. F. E. W. delegito UEA en London (Battersea).

Ĉeĥoslovakio.

Praha. La konata oratorino f-lino J. Šupichová, instruisnino, paroladis 14. VI. en "Kotolka" Lunigo de instruistaro ("Esp. kaj ĝia signifo por instruistaro") kaj 24. VI. en "Libera junularo grupo" (Ĥio estas esperantistoj?). La sama samideano verkis novan "Lernolibron por junaj ĉeĥaj esperantistoj", kiu celas propagandon de Esperanto inter la junularo.

Germanujo.

Germana Esperanta Asocio, Loka unuigo Dresden. Dresden. La monata kunveno la 30 julio en la malnova urbnokonsilia salono unuigis tre multajn dresdenajn kaj fremdajn samideanojn. Post sceligoj pri internaj aferoj, kaj amiaŭkongresa renkontiĝo tie ĉi la 2-4 aŭg. kaj la kongreskaravano al Wien, al kiu de Dresden aliĝis pli ol 50 personoj, ebla samideano dankis tre aminde pri la afabla akcepto kaj helpo, kiun li jam antaŭ jaroj por unufoje de la neforgesbla kongreso 1908, kaj ĉiam denove trovis ĉe ni. Pro la Dresden forlasanta samideano H. J. Krestanoff s-o Karsch diris forajn dankvortojn por la de li farita Esp.-laboro en nia mezo kaj s-ano Krestanoff en sia vigla maniero per karaj vortoj sin adiaŭis. S-ano Karsch ankaŭ dankis la ĉeestantaj s-ano Naumann el Grossenhain, por la de li jam dum jaroj farita laboro en maniero de Esp.-anguloj por gazetoj. Fine s-o Schramm prezentis Esp.-babiladon pri la Dresdenaj vidindaĵoj. Deutscher Esperanto-Bund.

Hispanujo.

Katalunujo.

Barcelona. Por soleni la transloĝigon de la esp. societo Nova Sento en la Kooperativon La Flor de Mayo, Wad-kas 195, okazis la 20 julio simpatia festo.

Paroladis la prezidantoj de la Regiona komitato de Kooperativoj.

Poste niaj senlaciaj apostoloj Delhi Dalmaŭ kaj Jaime Grau Casas sin turnis al multenombra publiko. La festo finiĝis per bela koncerto. Estas aranĝitaj du serioj da konferencoj pri diversaj temoj. Dura.

Jugoslavujo.

Novisad. S-o E. Schöneberger, stud. de tekniko, malfermis je la 15 julio la unuan kurson por intelektuloj, enskribiĝis 35 personoj (pastroj, doktoroj, pedagogoj kaj geoficistoj). Instruado laŭ Edmond Privat Parolad-vespero ĉiu merkredo, komuna propagandpromenado tra la urbo ĉiudimande.

15 julio okazis membrokunso de la "Esp. Laborista Rondo". Oni decidis, ke s-o F. Csauht, vicprezidanto de la Rondo partoprenu la duan landan kongreson en Split kiel reprezentanto de la grupo.

La 27 julio okazis membrokunso de la "Amika Rondo Esperantista" en Novisad. Oni elektis kiel reprezentantoj ĉi la du kongresoj s-ojn Marko Nešits, del. UEA por la XVI-a en Wien kaj Eugeno Römer por la II-a landa kongreso en Split. Je la aŭtuno oni decidis aranĝi Esperantan ekspozicion. Pl-o-ni-ro.

Nederlando.

Grandan sukceson por nia afero akiris samideano s-o J. J. Filoitt, Delegito UEA por Maasricht. En sia urbo, kie ankoraŭ estas malmulte da Esperantistoj, li sukcesis enkonduki Esperanton en la komerca Vesperelejo Lern-antoj ĉirkaŭ 150. Li mem estos gvidanto de la lecionoj.

Polujo.

Ostrowiec. Dank' al preparo de s-o Szwagierzak, prezidanto de Metalista Grupo, kaj zfablaco de s-o Iwaszkiewicz, direktoro de "Zakłady Ostrowieckie" (fabriko kun 5000 laboristoj) okazis la 13 julio prelego de Prof. L. Kronenberg je temo: Ĥio estas Esperanto? Cesis 500 laboristoj. Al kurso anonciĝis ĉ. 200 p. La fabrikdirektoro mendis por plua propagando 2500 E-o Lernolibron.

Skierzniewice. Jus okazis sukcesa prelego de s-o Prof. Kronenberg en societo de progresema junularo "Promieci" (Radio), dank' al helpo de gimnazia Prof. Stopa. Pola Esperanto Servo Bydgoszcz.

Rumanujo.

Arad. Du novaj kursoj: unu en la Laborista Hejmo, gvidata de f-lino Janka Wallner, la alia en la urba burĝa lernejo "Iosif Vulcan", gvidata de s-o St. Ferency Del. de UEA.

Bocsa-Montana (Banato). S-o Stéfano Simon, Del. de UEA, malfermis novan kurson por 25 partoprenantoj.

Braŝov (Transilvanio). Kurso kun 10 partoprenantoj komenciĝis, la 10 julio, en la ref. komerca lernejo. Instruas s-o Prager S. el Bukureŝti.

Bukureŝti. La partoprenintoj de la lastaj kursoj en Bukureŝti kaj Ploceŝti aranĝis komunan ekskurson al Breaza, la 6 julio.

Bukureŝti. Nova kurso por laboristoj, gvidata de s-ano D. Tejuŝan.

Caransebes (Banato). S-o Dro J. Horvath, advokato, Del. de UEA, malfermis kurson la 15 julio.

Ĥilia-Noua (Besarabio). Per la penadoj de s-o Eug. Ivanov, Del. de UEA en Bolgrad, kaj Nedjalkov, fondiĝis tie Esp.-grupo kaj malfermiĝis kurso por 10 personoj. Ĥilia-Noua estas urbeto ĉi la delto de l' Danubo. Ĝiurĝiu. En tiu danuba havenurbo s-o Stéfano Koch gvidas kurson por 6 personoj.

Radauti (Bukovino). Okazis ekzameno de la kurso gvidita de s-o E. Jarosiewicz, Del. de UEA. La 15 aŭgusto komenciĝos 2 novaj kursoj. E. R. C.

Rusujo.

Astrahani. En domo de klerigado estos malfermia Esp.-kurso, gvidata de s-ino Bogopolskii. Pri tio sisteme estis anonco en loka nacia gazeto "Komunisto".

S-ino S. V. Sariĉev gvidas Esp.-Kursan ĉe Aligrada lernejo.

I. VI. Pro varmega vetero Esp. okupoj en rondetoj "Kamvo", "Sovparŝkola", "Vodoprovod", "Necmen", "Krasnij Vostok" estas ĉesigitaj ĝis aŭtuno. La membroj de tiuj rondetoj libervole vizitias "Domo de klerigado" dimanĉe de la 6 ĝis la 8 vespere, kie oni interkonatiĝas, babilas esperante kaj ekscias ĉiujn novaĵojn pri esperantista movado.

15. VI. Nova esp. rondeto en urbeta Enotavsk en Astrahana gubernio. B. Aberin.

Kiev. Dum la lastaj monatoj Esperanto en Kiev estas bone disvastigita. Oni propagandis en multaj lokaj kluboj, lernejoj kaj diversaj regnaj organizoj. Jam estas organizitaj 9 apartaj rondetoj. Ĉe la rondetoj funkcias filioj de la Regnaj Kursoj.

La lokaj gazetoj preskaŭ ĉiutage enhavas artikolojn kaj sceligojn pri esp. vesperoj, ekspozicioj, raportoj, lekci-oj k. t. p.

Kievaj esperantistoj zorge klipodas enkonduki la lingvon en lernejojn. Kun permeso de la superaj instancoj de popolklerigado, nun oni aranĝas propagandajn lekci-ojn en laborlernejoj. Ĉiuloke lernantoj akceptas efikajn rezoluciojn. 350 enskribitaj junuloj senpencece atendas instruadon. En institutoj de popolo mastremado, politeknika kaj agronomia la studentoj insiste klipodas enkonduki Esperanton kiel devigan lingvon.

Dum okazinta en junio Pedagogia Konferenco, samideano Panishevski raportis pri Esperanto. Redakcia Komisiono de la Konferenco akceptis rezolucion enkonduki la lingvon en Pedagogiaj lernejoj de Kiev gubernio.

En Kiev oni intencas malfermi Regnan Instituton kaj Domon de E-to, kiu enhavos centran klubon kun biblioteko kaj legejo, muzeon, konstantan ekspozicion k. c. Kelkaj el agemaj Kievaj esperantistoj estas komisiitaj komenci vastan propagandon en distriktaj urboj.

La Regnaj Kursoj en Kiev estas centro de la agado. Ĉi-tie aperas du murgazetoj: "Radio Kiev" kaj "Saitrido". Krom tio, oni kunlaboras en multaj murgazetoj neesperantaj, kie estas havataj esperantaj fakoj. Kursoj kolektas materialon por internacia krestomatio, sub redaktado de V. N. Devjainin. La lasta preparis jam "Kompletan Kurson de E-to en 25 lecionoj", laŭ praktika metodo. Krom tio, li kunmetis esperantan sintakson kaj tradukis kelkajn gravajn verkojn: "Rusanoj", "Neorgana evolucio" (fermado de mondoj k. c.). S-o Panishevski kunmetis la unuan lernolibron por ukrainianoj "Elementoj de Esperanto". S-o Fedotov tradukas "Historian materialism" de Buĥarin.

Svedujo.

Sinjorino Tingley en Svedujo.

Mjölby. La 15 julio alvenis al Svedujo la mondfama s-ino Tingley el California. Tuj post la alveno en Svedujo ŝi forveturis al la insulo "Wisingsö" (en la lago "Watern"). Ŝia celo estas ĉi tie sur la insulo fondi centron de ŝia movado por tuta Eŭropo kiel jam Point Loma en California estas por la nova mondo. Laŭ ŝia parolado, ŝi intencas fari ĉi tie lokon por eduka kaj homama agado" por tuta Eŭropo. Tial oni aranĝas kursojn. Tiaj por infanoj de la insulo jam komencis. Oni instruas ilin en la lingvoj: germana, angla, franca, hispana kaj sveda. Ankaŭ en arto, literaturo, dramato, stenografio kaj dektilografio. Tiuj ĉi kursoj estas senpagaj. Dum sia vojaĝo ŝi estas akompanata de kelkaj ĝeneralnatoj el sia lernejo "Baja Yoga" ĉe Point Loma, Cal Ciudadmanĉe ŝi paroladas ekstere al interesuloj. Mi aŭdis la unuan paroladon de ŝi la 20 julio, sed bedaŭrinde ŝi peroladis nur angle (ĵus tiam mi ekpensis pli nia kara lingvo kiu disiras ĉiujn lingvaj limojn). Ŝi restas ĉi tie ĝis la unuan de septembro. Tiam ŝi revertois al Lisono kaj dum tiu ĉi vojaĝo ŝi intencas viziti kelkajn landojn de Eŭropo. C. P., Mjölby.

Moatalo. (Östergötland). Kurso gvidata de Erik Johansson. Erik.

Gazeto, kiu manku en neniu biblioteko esperantista

INFORMOJ de Esperanto-Asocio de Estonio.

Ĉiujmonate aperante, regule jam pli ol unu jaron (ilustrita, 8-paĝa), "Informoj" liveras al leganto rican materialon, zorge verkatan de konataj samideanoj, pri Esperanto-societa vivo, organizaj demandoj kaj propagando, lingvaj atentiĝojn, adresojn ktp.

Unika

pro sia pure esperanta karaktero! Konstantaj fakoj: El la Estonia Esperanta movado, Kritiko-Bibliografio, Demandoj k. Respondoj, Faktoj por propagando, diskutoj, "Inter ni" (malfermia al ĉiu leganto) kaj ceteraj.

Mendu specimenon, ne forgesante aldoni respond-kuponon.

Abonkondiĉoj: jare 3,50 sv. fk., duonjare 2.— sv. fk., kvaronjare 1 sv. fk. aŭ la ekvivalento per alia mono. — Anoncoj: 1 cm 0,05 sv. fk.

Admin. de Esp.-Asocio de Estonio, Tallin :-: poŝtkesto 6.

Aperis tradukite de Henriko Seppik tri altnivelaj verkoj de estona pler bona novelisto Friederbert Tuglas.

Novelaro:

Kvin noveloj. 175 paĝoj. Kun portreto de la aŭtoro kaj artikolo de l' tradukinto pri la estona beletristiko. Fundamenta prezo: 3,5 sv. fk.

Noveloj:

En la fino de la mondo. 56 paĝoj. Prezo: 1 sv. fk. Popl kaj Huhuu. 52 paĝoj. Prezo: 0,50 sv. fk. Aria traduko. Bela eksterejo. Luksa papero. Placa arango.

Por sendkostoj aldonu: Latvoj kaj Litovoj 50/100, aliaj landoj 100/100.



Eldonejo M. Tamverk Esperanto-fako. Karja str. 5, Haapsalu, Estonio,

Kodo de Georges Lugagne

estas la plej bona kodo

7-lingva kun Esperanto-parto. :-: Prospekto havebla per

Société des Codes Télégraphiques Georges Lugagne 22 rue Pasquier. Paris (Francujo).

Se vi bezonas Esperantajojn

postulu la riĉenhavan katalogon de
niaj multe ŝatataj eldonaĵoj!
(Lerno- kaj ekzercolibro, vortaroj,
literaturaj verkoj ĉiusecaj,
insignoj, propagandiloj ktp.)
Abonu nian gazeton Germana Esperantisto!

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G.m.
Berlin SW 61, Wilmstrasse 5 (Germanujo)

Esperantista Junularo
Organo de UEA-Junularo - bela por
infana literaturo - Internacia lernejo-
servo. Abonprezo po numero 1/2 franko
de letero por eksterlando (jare 8 n-oj).

Novaj tempoj.
Gazeto de la esperantista
instruistaro, propagandas
novan pedagogion, per-
laboran lernejon kaj pe-
dukan pacon. Petu
specimenon de:
M. Goldberg, Leipzig-Co.

Kio estas S.A.T.

- S.A.T. estas organizo celanta meti Esp. je la servo de
la proletaro tiumonda
S.A.T. estas peresperanta aparato neniel politika
S.A.T. kvankam utilcela, laboristoserva, estas samtempe
aldeidalea; ĝi celas krei ĉe siaj membroj sennaci-
ecan spiritosiaton.
Kiajn organojn havas S.A.T. por
plenumi tian taskon?
S.A.T. eldonas por plenumi tian taskon monatan revuon,
ilustritan kun literatur-scienca aldono:
Sennacieca Revuo
S.A.T. eldonas per sia Eldonkoopertivo gravajn verkojn
el kiuj 'Fautisto' de Goethe kaj 'Eklumo en
Abismo'n' de H. Barbusse estas jam aperintaj
S.A.T. eldonas ĵarlibron, entenanta la adresojn de sia
membraro statistikejn pri la laborista movado en
la mondo kaj plej diversajn sciindaĵojn.
Kion jam faris S.A.T.?
S.A.T. okazigis 5 kongresojn, kies lasta estis honore
prezidata de la fama scienculo A. Einstein
S.A.T. vekis ĉe la esp. laboristaro grandan intereson,
veran entuziasmon kaj per tio certigas la sukceson
de Esp. en proletaj randoj.
S.A.T. estas lege enregistrita en Francujo. Detalojn oni
petu skribante al la sidejo. Adreso: Sennacieca
Asocio Tiumonda, 28 rue Boyer, Paris XX.

La plej malmultekosta libro en
Esperanto
Ĉiu devas nepre posedi la libron
Eŭropo
ĉe la abismo
de
Francesco Nitti
iama ministrara prezidento itala
Esperanto-traduko
kun speciala antaŭparolo de la eminenta aŭtoro.
(Preskaj 240 paĝoj.)
Prezo 4 sv. fk.
Mendu tuj!
La libro al privatpersonoj okazos nur post antaŭa pago
de la sumo de 4 sv. fk. plus sendkosto de 25 centimoj
po ekzemplero, payable en la valuto de la koncerna
lando, transkalkula je la kuro de la borsoj de Zŭrich
(Revdanditoj turnu sin pro specialaj kondiĉoj al la eldonejo)
Skribajn mendojn adresu al:
Frankfurter Societäts-Druckerei
G. m. b. H.
Abtlg. Buchverlag - Frankfurt a. M.
Korespondon en Esperanto: - Ilustritaj kartoj rifuzataj.

Ni volas pruvi, ke la esperanta lingvo
taigas jam por efektive fari mondkomer-
con per ĝi. Do ni serĉas komercajn
kaj teknikajn kunlaborantojn, kiuj en-
sendos al ni mendojn kaj komisionojn
por aĉeti kaj vendi.
Ĉi tie oni povas favore vendi nutrarojn;
tre malmultekoste aĉeti industriaĵojn.
- Ni havas vere boneganj interrilatojn
kun unuaklasaj fabrikoj, kiuj liveras
sub la plej favoraj kondiĉoj novajn aŭ
uzitajn feraĵojn, metalojn, lojn, val-
vojn, kranojn, terkultir- kaj ĉiajn
aliajn maŝinojn, kampar-fervojon, ĉiajn
elektran, gumajn, ŝtopajn, ŝmirajn, pentran,
papiran artikolojn. Por ke nia provo suk-
cesu, ni petas nur seriozajn komision-
kaj mendojn. Al peruloj ni prezentos pro-
centaĵon. Petu de ni oferton.

Metaferum,
Warenhandels-Gesellschaft
m. b. H.
Aŭstrio, Wien IX,
Währingerstr. 6.

Legu la libron:
Milionoj
da homoj
nun vivantaj
neniam
mortos!
Ĉiu vera esperantisto estas
idealistoj kaj tial nepre devus
posedi tiun ĉi libron, laŭ kies
enhavo la plej ideala ora
epoko de la homaro estas
en krepiĝinta dum la nuna
kruza stato de la mondo, kie
estas a-kvata de la plej
bonaj kaj plej favoraj imag-
eblaj cirkonstancoj sur la
tero. Ĉiuj klarigis bazas sur
la Biblio kaj ĝiaj profetioj
por la Regno de Dio sur la
tero. - Prezo 1.25 sv. fk.
aŭ 1.- or. mk. - Mendu ĉe
Garda Turo,
Biblio- kaj
Traktat-Societo,
Esperanta Fako,
Landstr. 277,
Rieden bei Baden,
Svislando,
Poŝteĉkontoj:
Aarau VI, 1905,
Karlsruhe 70256.

La Batalanto
Eldonejo
Hannover, Bürgermeister Fink-str. 19.
Al eterna paco
de Imanuel Kant
Tradukita de la fame konata
tradukisto Prof. P. Christaller.
Prezo: 2.- ormarkoj (2,80 sv. fk.)
Sendkosto 10%.
Ĝus aperis:
Batalantoj por
la homara paco
de D-o Winfried Fricke.
Prezo: 25 fenigoj. Sendkosto: 5 fenigoj.
Por progandataĵoj: 25 ekz.: 5,50 or-mk.;
50 ekz.: 11.- or-mk.; 100 ekz.: 21.- or-mk.
Bonvolu pagi en rekomendita letero
en or-mk. aŭ egalvaloro en alia valuto.

Anoncetoj.
Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fianĉigo, edziĝo, morto, okar-
ontaj gravaj esp. kunveno, festoj k. s.) senpage.
Aliaj anoncetoj, nur akceptataj per minimume du sinsekvaj enpresoj,
kostas 20 du enpresoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezo de
ok ET-numeroj kontraŭ antaŭa pago. Abonantoj ĉe kiuj ni povas de-
preni la pagon de la abonkonto, ĝuas por propraj anoncetoj preferan
prezon de kvin ET-numeroj. Germanojn pagas 2.- mk., prefera prezo
por postabonantoj 1.25 mk. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ
publikigo.

- KARAJ SAMIDEANOJ. Kiu de vi sendos al mi la numerojn 7
(265) kaj 8 (264) de gazeto 'Esperanto' el i. 1922, rice-
vos de mi la du lastajn eldonaĵojn de la BES-a Adresaro
aŭ ion alian laŭ sia propra desiro. Molnar Jan, Praha-
Devjice 509, Ĉeĥoslovakio. [2]
DEVENULOJ de s-o Frederick Donner, naskiĝis Rosemaro
Preasz, Pommeren, la 18 de aŭgusto 1854, estas ser-
ataj de s-o Walter A. Donner, 1459 East 65 th St., Cleve-
land Ohio, U. S. A. Miaj gepatroj estis John Donner
kaj Elesabet (Hegger) Donner. [2]
NASKIĜO! Geedzaj Papp en Pŭspökjadany, Hungarlando,
kun ĝoio sciigas ke naskiĝis filo, nomata Jolt, Endre [1]
NASKIĜO. Al ges-oj Lorenzo Csaugh kaj Rozalio Zammer
en Novisad naskiĝis filino, nomata Anna-Amalia.
Al ges-oj Jozefo Munka kaj Irene Bajj naskiĝis filino,
nomata Jozefo. (Ni gratulas: Esp. L. R.) [1]
FILATELISTOJ. Profitu antaŭ eldonado de 1925 katalogoj!
Ni vendas plej malmultekoste belgajn poŝtmarkojn: 5 fr.
Brusela ekspozicio 1924: po fr. 20; kvarmarka folieto:
fr. 70; 5 fr. Montenez: fr. 50; Caritas 1910-1911 plena
kolekto: fr. 25; Reĝu kun kasko 1 c. ĝis 50 c. uzitaj:
fr. 10, neuzitaj: fr. 12.50. Aldonu sendkoston: fr. 1.50.
Ĉiujn novaĵojn ni liveras (neuzitajn), je nomata valoro
+ 50% + fr. 1.50. Petu prezojn de aliaj belgaj poŝt.
Adreso: Van Ooyen & Co, Lange Pothoekstraat 86,
Antwerpen (Belgujo) [1]
TRE URGĀ MONAFERO! Kiu s-ano prunedonas al ni
140.- mk. germ. (35.- dolarojn). Ĉi tiu sumo estas
bezonata por favora aĉeto, kiu okazos en la intereso
de la Esperantimovado. Repago okazos plej malfrue
decembro de ĉi tiu jaro aŭ per partipago monata.
Oferton sendu al: Proler. Esperanto Pressedienst, Leip-
zig Kleinzsch. Hirzel-Str. 27 II r. [2]
GERMANAJ TURISTOJ! Du samideanoj, naturamantoj
de la 'Flandra Turista Unuiĝo' deziras bicikle tra-
vetenojn Reinlandon. Alveno en Köln la 31 aŭgusto; re-
veno tie la 7 septembro. Celo: vizito de la Reinbordoj
ĝis Mainz-Frankfurt. Kiu germana samideano volas
partopreni kun ni? Ni deziras korespondi pri tiu temo
kun gesamideanoj de la Reinregiono; bildkartoj (bfl.)
(Ni estas 25 jaroj). Remi Van Eynde, Lüibredingsstraat
184, Berchem-Antwerpen, Belgujo. [4]
ET 1920-22. Mi vendas n-ojn 1-100. Oferton al E.
Muthschall, Güterabfertigung, Senftenberg (Laus.), Ger-
manujo. [2]

Korespondeo kaj Interŝanĝo.

- Fraŭlo deziras korespondi kun gesamideanoj ĉiutaldira per
il. PK kaj L. Ĉiam respondos. Adreso: K. Leontenko,
Jurevska 17-16, Niŝni-Novgorod. [2]
Edziĝon al sperta kaj agrabra samideano 25-35 jara
sendependa kaj volaĝema, deziras konata propagandis-
titoramanto posedanto de vizio ktp. en neŭtrala lando,
por kameraĵo kunlaborado kaj propagando de Esper-
anto. Konfidence skribu kun bildo al eldonejo de ET. [2]
100 diversaj germanaj PM 5 sv. frk. aŭ samvaloro. Franko
ekstra. Adreso: Reinhold Pfiffczyk, Gladbeck i. W., Höhen-
str. 10, Germanujo. [4]
S-o Hugo Banninger, Grossarl (Salzburg), Aŭstrio, de-
ziras korespondi per il. PK kun L kun la tuta gesam-
ideanaro. [2]
F-lino Adelaide Antonellini ne plu estas en Potenza, sed en
Roma 48, Viale Angelio Cooperativa I. Villino. [2]
Deziras korespondi kun la tuta mondo s-o Kresik, adreso
Krjukov, Gubfo, s-o Hainskij el Krjukov kaj s-o L.
Moskvin, Gubkiom RKSM, ĉiuj personoj en Irkutsk,
Siberio, Rusujo. Ili estas 17-18 jaraĵ. [2]
S-o Antonio A. Havar, X. Madi str. 15/b l. 12, Budapest,
Hungarujo, deziras korespondi per il. PK, preferu kun
ekstereŭropaj gesamideanoj. Krome vendas malkare
diversajn poŝtkartojn, leterpaperojn, Esperantaĵojn. Ĉiam
respondos al ĉi. [2]
S-o Georgi Cardarov, bul. Slivnica 101, Sofia, Bulgarujo,
deziras korespondadon tiumonda nur kun mandolnaja
georkestranoj Nepre respondas. [2]
Fraŭlo Franz Kolař, Steyr, Wiedenfeldpl. 52, Aŭstrio
deziras korespondi kun tiumonda samideanoj. Inter-
ŝanĝas ankaŭ PM. Ĉiam respondos. [1]
S-o Nikolaj Zjubomirov ŝanĝis sian adreson. Atentu
gesp-istoj, li korespondadas kun tuta mondo per temo
'Kio estas l' amo.' Adreso: Nikolaj Tiubomirov, Berko-
vica, Bulgarujo. [1]
Mi serĉas diligentajn korespondantojn de la tuta mondo
per L kaj PK il. pri diversaj temoj. Mi certe kaj tuĵ al
ĉiuj respondos. S-o Rudolf Charbulak, komercisto,
Hranice, Moravio, Ĉeĥoslovakio. [1]
Jar. Drvota, komercisto, Domažice, Ĉeĥoslovakio, deziras
interŝanĝi PI kun ĉiuj landoj. Ĉiam certe respondos. [2]
Du amikoj, samideanoj Francisko Badura kaj Romano
Smiga, ambaŭ en Stonava, Silezio (Ĉeĥoslovakio), de-
ziras serioze korespondi kun gesamideanoj ĉiutaldira
per il. PK kaj L. [2]
S-o T. F. Tuovinen, Mikkel, Finlando, serioza esperantisto,
deziras korespondi kun astrologoj, okultistoj, framasonoj. [2]
S-o Livingstone Jenkins, 64 St. Thomas Rd., London N. 4.,
Anglujo, deziras korespondi kun la tuta mondo kaj
interŝanĝi esp. gazetojn, propagandilojn kaj PM. Certe
respondos al ĉiuj, kiuj skribas. [2]
S-ano Paul Kaiser, Traubensfr. 60, Stuttgart, Germanujo,
deziras korespondi per L kaj interŝanĝi artajn il. PK
kaj PM. [2]
S-o Debarbieri Guglielmo, Via Casaregis 55, Genova,
Italujo, deziras interŝanĝi PM kun la tuta mondo. Pre-
feras: Svislando, Svedujo, Turkujo, Francujo, Norvegujo,
Hispanujo kaj Portugalujo. [1]
S-o Francisko Schwarz, Sobinovska ul. 55, Prešov,
Ĉeĥoslovakio, deziras serioze korespondi kun ĉiutaldiraj
efektive veraj kaj insistant Esperantistoj eventuala pretere
kun s-inoj. La temon de la korespondado oni povas
reciproke fiksi. Certe respondos. [1]
S-o Francisko Dudas, policoficisto, Szerb u. 5, Budapest,
Hungarujo, deziras ricevi 100-200 poŝtmarkojn neper-
litajn kaj sendifektajn interŝanĝe. [1]
S-o L. A. De Greef, 28 rue Hayettes, Lodolinsart, Belgujo,
deziras korespondi per il. PK kaj L kaj interŝanĝi nacian
gazetojn kaj PM kun la tuta mondo. [2]